# ESPERO KATOLIKA

(monata revuo fondita en 1903)

JARKOLEKTO 68 n. 617

n.ro 4 - 5 Aprilo - Majo 1971

## ESPERO KATOLIKA

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

Redaktoro: **Vakas**

Respondeca Komisiono: Longoni, Flammer, Scherer

Provizora Redaktejo: ĉe la Prezidanto de IKUE

Eldonejo: Fiamma del S. Cuore - Vicolo S. Antonio 2 - I - 10023 CHIERI (TO)
Tel. 942758 - c.c.p. 2/837


## Estraro de IKUE:

Prezidanto: pastro Ferdinando Longoni
via S. Ambrogio, 2 - I-20051 Limbiate (MI) - Italujo

Vic-Prezidanto: Sin.ro N. W. Vigar
28 Franklands Drive - Addlestone - Surrey - Anglujo

Sekretario-kasisto: sin.ro Paul Scherer-Graber
Erlenstr. 58 - CH 6020 Emmenbrücke (LU) - Svislando

Vic-Sekretario: pastro Wilhelm Flammer
Zürchermühle - CH 9106 Urnäsch. - Svislando

Konsilantaranoj:

pastro A. Beckers - Kwaadmechelen - Belgujo
patro Lovro Kiŝ, ofm, Ŝetaliŝte 2 - 56236 ILOK - Jugoslavio
sin. Walter Mudrak, Beatrixgasse 19/9 - A-1030 WIEN - Aŭstrujo
f.ino prof.ino Corry van Kleef - Koewijzend 28, BLOKKER - Nederlando
sin. Miloslav Ŝvàĉek - Penĉice 16, okr. Přerov - Ĉeĥoslovakujo
sin.ro Aleŝ Berka - Na harazi 1423 Vsetìn - Ĉeĥoslovakujo
patro Manuel Casanoves, Lauria 5 - Barcelona 10 - Hispanujo

Centra Oficejo kaj Arkivo: ĉe la Vic-Sekretario, Flammer

# PREĜO AL MARIA



Virga Patrin', filin' de Filo via
pli ol kreaĵ ajn alta kaj humila
fiksita celo de konsil'eterna

vi estas kiu la naturan homan
nobligis tiel, ke Farinto ĝia
de ĝi farita esti ne malŝatis.

En ventro via reekbrulis l'Amo,
per kies varmo en l'eterna paco
ĝermadis tiel jam ĉi tiu floro.

Por ni ĉi tie vi tagmeza torĉo
de la Karito, kaj ĉe l' moreculoj
la fonto viva estas de l'Espero.

Madono, tion granda kaj valora
ke, se volant' de graco ne alvokas
vin, li deziras flugi sen flugiloj.

Korfavoreco via ne nur helpas
kiu vin petas, plie, multajn fojojn,
la peton antaŭkuras malavare.

Ĉe vi indulgo, ĉe vi kompatemo
ĉe vi grandanimec', ĉe vi kuniĝas
de l'kreitaĵoj ĉiu ajn boneco

**Dante - La Dia Komedio, komento de la 33-a kanto de la Paradizo (esp.igis Peterlongo**

---

## La preĝcelo de la Papo por la Maja monato:

## POR, KE ONI TROVU EFIKAJN MANIEROJN POR FORIGI ATEISMON

La mondfama abato Pierre, la helpanto de senhejmuloj, serĉis specialajn brikojn por fini malgrandan domon, en kiu estis loĝonta trenombra familio de malriĉuloj. Oni diris al li, ke itala laboristo posedis tiuspecajn brikojn sed, ankaŭ, ke tiu estis ateisto, kaj treege malamiko de sacerdotoj.
Abato Pierre iris al la terura homo, kiu malakceptis lin, kaj tre malmilde akuzis la tutan religion. Sed, kiam abato Pierre petis al li brikojn, kaj konatigis al li la kialon, la itala laboristo eksciis ankaŭ, ke abato Pierre ellaboradis persone en la konstruado de domoj por la malriĉuloj; li donis brikojn senpage, kaj diris al li: « Mi ne scias, ĉu Dio ekzistas, tamen mi opinias, ke, se Dio ekzistas, Li estas tio kion vi faras ».

# NIA NOVA PREZIDANTO



Pastro Ferdinando Longoni, naskiĝis en Milano dum la jaro 1916.a, en trenombra familio de laboristoj. Fariĝis sacerdoto en la jaro 1939 post la komunaj kaj la akademianoj studoj de teologio.

Sia vivo trapaŝis ĉiam kiel paroĥestro en la zorgo de fideluloj. Sian libertempon donis al diversaj aktivecoj.

Esperantiĝis en 1954, kaj partoprenis IKUE-Kongresojn de Romo (1962) de St. Gallen, de Limburg kaj de Klagenfurt.

# SALUTO KAJ PROGRAMO DE LA NOVA PREZIDANTO

Mi prezentas min al ĉiuj IKUE-anoj kun la plej kora saluto kaj kun la plej sincera bondeziro de ĉio bona.

Antaŭ ĉio mi devas vin danki pro la tiom nombraj voĉdonoj per kiuj vi elektis min Prezidanto; tio estis signo de via fido je mi. Mi kontraŭŝanĝas per same granda fido je vi ĉiuj, je ĉiu membro, je la delegitoj kaj la perantoj, precipe je la estraro, kies membroj estas ĉiuj spertaj kaj meritoplenaj. Mi multe kalkulas sur ili por povi atingi kelkajn rezultojn.

## Kial ĝuste mi?

Mi demandis tion al mi mem. Certe la respondo ne troviĝas en miaj personaj kvalitoj, ĉar mi estas la unua kiu rekonas, ke ili ne estas sufiĉaj en mi por tia pozicio; mi opinias ke la respondo povas troviĝi en la rolo, kiun mi ludis per firma kaj energia sinteno, dum la kunvenoj de Limburg kaj Klagenfurt, ĉu rilate la respektemon al la Sankta Seĝo, ĉu rilate la ekzaktan koncepton de ekumenismo.

Ankaŭ se la ĉeestantoj en Klagenfurt estis nur iom pli ol 20, tamen la raportoj poste publikigitaj klarigis al multaj membroj la situacion kaj la respektivajn poziciojn. Mi devas rekoni, ĉirigarde, la valoran agadon, kiun la itala bulteno « Katolika Sento » disvolvis.

## La nuna situacio

Nun la situacio ne estas tute roza; por konvinkiĝi sufiĉas legi atente la oficialajn raportojn de la vicsekretariino, de la kasisto, kune kun la protokoloj de la voĉdonoj. Kiu scias legi, tiu scias ankaŭ mediti pri la situacio. Sed oni povas reflorigi la tutan Asocion se ĉiuj alportas sian malavaran kontribuon; kaj ĉiu devas plenumi sian devon. Jen kiamaniere:

La Prezidanto: havi koron kaj orelojn sentemajn al la voĉoj de ĉiuj membroj; atenti la verajn necesojn de la katolika mondo kaj la devojn de la katolikoj de la tuta mondo;

esti firme sindona al la Sankta Hierarkio, kies voĉo estas ĉiam la plej bona gvidilo en la nuna tempo de konfuzo.

La Estraro: disdoni inter la estraranoj la taskojn por agi ĉie ajn, kie la Prezidanto ne povas agi; kunlabori por la organizado kaj la disvolviĝado de IKUE; sin okupi pri la rilatoj kun la landaj Asocioj, prepari la kongresojn, igi fluema la laboron de la tuta interna organizo. Ĉio ĉi tio signifas veran sindediĉon, ne malgrandan, kaj personan oferon por atingi ion bonan.

La delegitoj, la perantoj, la landaj Asocioj: esprimi siajn dezirojn, siajn proponojn; sciigi pri la faktoj de sia nacia kaj asocia vivo; informi kaj klarigi pri la vivo de la Eklezio kaj pri la rilatantaj problemoj en sia lando; konvinki la eks-IKUE-anoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj malproksimiĝis; valorigi ĉiujn disponeblajn fortojn.

## La revuo « Espero Katolika »

Ĝi estas kaj devas ĉiam esti la fidela spegulo de nia movado, rilate ĉu la estraron, ĉu la bazon. Gi devas doni bildon de la monda situacio rilate ĉion, kio povas igi nin katolikojn sentemaj kaj povas nin instigi al laboro en la kampoj de la karitato kaj de la apostola agado. Ĝiaj ĉefaj temoj estos: a) la voĉo de la Eklezio b) la liturgio c) la karitato rilate la necesojn de la plej bezonuloj ĉ) la problemoj de la junuloj e) la ekumenismo.
Espero Katolika pritraktos ĉiam tion, kio kunigas nin, ne tion, kio nin dividas (cetere esperanto naskiĝis por kunigi, ne por dividi); kaj ne estas ankaŭ esperantistoj sed ĉefe disĉiploj de Jesuo, kiu preĝis la Patron « por, ke ĉiuj estu unu ».

Niaj rilatoj kaj la kunlaboro kun UEA kaj KELI devos konsekvenĉe esti sinceraj.

## Realismo

Estas evidente, ke tiu programo estos realigebla per la bona volo de ĉiuj sed ankaŭ per materiaj rimedoj, antaŭ ĉiuj la financaj. La unua fonto de niaj financoj estos la ordinaraj

pagantaj membroj; la dua estos la subtenantoj kaj la helpantoj de nepagipovaj membroj, kiuj estas multaj, precipe en Orienta Eŭropo. Ni ne devas forgesi, ke organizo havas diversajn, eĉ pezajn, elspezojn sed ni povas marŝi en nian estonton kun fido se ni havos grandan nombron da membroj.

### Konkludo

Sen ombroj kaj miskomprenoj ni deziras kunlabori kun ĉiuj, ankaŭ kun tiuj movadoj (eventuale neesperantistaj) kun kiuj tio estas ebla je monda nivelo en la kampoj de la apostola agado kaj de la karitato. Dio helpu nin ĉiujn por, ke nia tasko sukcesu antaŭenigi per la rimedoj de la moderna informado la parolon de Dio, kiu ĉion renovigas kaj ĉion skuas.

**La Prezidanto**
**Don Ferdinando Longoni**

---

Sendis gratulojn al nia nova Prezidanto

| | |
|---|---|
| de la Ĉeĥoslovakio | - Berka, Ŝvaĉek, Grim, Majtan, Filip, Karulovà, Malcovà, Suchankovà, kaj ĉiuj komitatanoj de katolika sekcio; |
| de la Yugoslavio | - Kiŝ, Oreb; |
| de la Pollando | - Paruzel, Nowakoxwki, Gucwa, Rybicki; |
| de la Aŭstrujo | - Mudrak, Dürrschmid, Nagy, Casar; |
| de la Nederlando | - van Kleef, Tujnder, Wannemakers, Hoen, Durenkamp; |
| de la Svislando | - Flammer, Ludin; |
| de la Belgujo | - Beckers; |
| de la Hispanujo | - Casanoves, De La Puente, Claramunt, la hispana esper. katol. bulteno; |
| de la Germanujo | - Maul, Thalmayer; |
| de la Bulgarujo | - Jakov; |
| de la Francujo | - Thiollière, Pierru, Colas; |
| de la KELI | - Burckardt; |
| de la UEA | - Lapenna; |
| de la Itallando | - Ciccanti, Jacobitti, Duranti, Cecchitelli, Falcoz, Galbusera, Remenyi Puracchio, Ruaro, Sola, Praglia, Korytkowski, kaj la kunvenintaj en Bologna. |

Al ĉiuj la nova Prezidanto sukcesis respondi dankante, kaj petante preĝojn por sia ne tro facila tasko.

## PROTOKOLO

pri la skriba baloto por novelekto de prezidanto kaj estraro de IKUE, laŭ decido de la ĝenerala kunveno de IKUE en Klangefurt, je la 28-a de julio 1970.

En la tempo de la 15-a de oktobro ĝis la 19-a de januaro 1971 alvenis ĉe la prezidanto de la balota komisiono, s-ano Karl Dürrschmid en Klangenfurt

## 172 voĉdoniloj el 18 landoj.

Unu de la sendintoj elektis neniun. 4 nur prezidanton. 11 sendintoj elektis por la estraro ankaŭ samideanojn ne estantajn kandidatoj. Tiamaniere ricevis la gesamideanoj s-ro Maul 4. sac. Thalmaier kaj sac. Paruzel po 2, episkopo Pichler, P. Ciccanti, P. Wannemakers, P. Jacobitti, P. Lago, Sr. Duisas, prof. Görlich kaj la s-roj Eiti Minami kaj Majtan po 1 voĉon. Unu elektis pastoron Burkhardt.

Laŭlande la voĉdoniloj dispartiĝas jene: Ĉeĥoslovakujo 71, Polujo 20, Germanujo 14, Aŭstrujo kaj Nederlando po 12, Francujo 11, Italujo 9, Hispanujo 5, Belgujo, Svisujo kai Kanado po 3, Jugoslavio kaj Usono po 2, Anglujo, Argentino, Israelo, Malto kaj Vatikano po 1.

La balotado havis jenan rezulton:

| | **Por prezidanto:** | **voĉoj** |
|---|---|---|
| 1 | pastro Longoni | 92 |
| 2 | s-ro Tuinder | 43 |
| 3 | pastro Bekers | 11 |
| 4 | pastro Flammer | 7 |
| 5 | s-ro Berka | 6 |
| 6 | s-ro Mudrak | 4 |
| 7 | patro Casanoves | 3 |
| 8 | patro Jacobitti | 1 |
| 9 | patro Kiŝ | 1 |
| 10 | f-ino v. Kleef | 1 |
| 11 | pastro Paruzel | 1 |
| 12 | s-ro Perko | |

| | **Por la estraro:** | **voĉoj** |
|---|---|---|
| 1 | s-ro Berka | 152 |
| 2 | s-ro Mudrak | 149 |
| 3 | patro Casanoves | 142 |
| 4 | patro Kiŝ | 141 |
| 5 | pastro Flammer | 140 |
| 6 | pastro Beckers | 137 |
| 7 | f-ino v. Kleef | 132 |
| 8 | s-ro Scherer | 131 |
| 9 | s-ro Vigar | 119 |
| 10 | s-ro Svaček | 115 |
| 11 | s-ro Perko | 103 |
| 12 | s-ro Tuinder | 65 |
| 13 | pastro Longoni | 47 |

La membroj de la balota komisiono akurate kontrolis ĉion kaj trovis ĉion perfekte farita. Pro tio ili deklaras, ke la supre skribitaj rezultoj estas veraj.

LA BALOTA KOMISIONO

Prezidanto sig. K. Dürrschmid
Membro sig. F. Galbusera
Membro sig. Franz Casar
A-9010 Klangefurt, 4-a de februaro 1971

Raporto de s-ro Dürrschmid al la Ĝenerala Sekretario de IKUE:

Je ĵaŭdo la 4-an de februaro 1971 venis s-ro Franco Galbusera el Verona, Italujo, kaj s-ro Franz Casar el Klagenfurt en mian loĝejon en Klagenfurt kaj ni tri membroj de la balota komisiono akurate kontrolis ĉion kaj subskribis la aldonitan protokolon.

Vi kiel ĝenerala sekretario de IKUE certe nun informos la elektitojn pri la rezulto de la skriba balotado kaj aranĝos la necesajn paŝojn por starigi la novan estraron de IKUE.

Laŭ nia opinio la malsukceso de s-ro Tuinder ĉe la baloto ĉefe estas kaŭzita per la skribmaniero kaj atakemo de la redaktoro de nia « Espero Katolika », s-ro Stefan Maul. Pri ĝi ne nur la slavoj, sed ankaŭ la italoj, francoj kaj hispanoj estas ŝokitaj.

(...) Venis al mi plendoj el Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Italujo kaj Polujo. La granda malkontento ja ankaŭ montriĝas el la rezulto de la balotado. Pro s-ro Tuinder mi bedaŭras ĝin, ĉar li certe estis fervore kaj ambicia prezidanto. Ankaŭ s-ro Maul estas sendube kapabla redaktoro. Sed, kiel prave skribis P. Kiŝ, tio sole ne sufiĉas. Li ne komprenis, ke la percepto de la religio ĉe la slavoj kaj romaniaj popoloj estas tute alia ol ĉe la ĝermanaj popoloj. Kaj ĉefe la slavoj, kiuj devas vivi sub la forta premo de la ateista komunismo, estas forte ŝokitaj pri la atakoj al papo kaj eklezio en EK. Mi volas fini per la deziro multfoje skribita al mi, Dio donacu al IKUE pacon kaj konkordon, por ke nia katolika Esperanto-Movado kresku kaj prosperu! Ke la nova estraro kaj prezidanto tion atingu, estas mia arda deziro! Plej kore kaj samideane mi salutas vin, samcelane via

**K. Dürrschmid**

## JEN LA NOVA REVUO

Ĉiuj arde atendis tiun-ĉi numeron.

Sendube tiu povis esti ankoraŭ pli bela ol la jena; tamen, kiam la malfacilaĵoj, paŝon post paŝon, malpliiĝos, kiam la revuo, samtempe pliboniĝos.

Ni ne havas ankoraŭ redaktoron: ni estas ankoraŭ serĉantaj.

Tamen la revuo havas respondecan direktoron (kiu estas la Prezidanto) kiu plenumas sian taskon kun helpo de kunrespondeculoj (Flammer, kaj Scherer). La abonkotizo al nia revuo estas tri usonaj dolaroj (aŭ egalvalora kvanto en alia mono).

Ĉi tiu kajero de EK esta programa numero; ĝi iom estas la relanĉo de la « nova vojo ». Kiuj deziras havi plurajn kopiojn por disdonado tra la amikoj, por ilin regajni al IKUE, povas ilin mendi rekte al mi.

Por la pago ili sin turnu al sia nacia peranto. Ĉiu kajero kostas unu guldenon, aŭ egalvaloran monon

### Adresaro

Kompreneble, dum la aranĝo de nova adresaro, okazis konfuzigo de nomoj aŭ de adresoj.

Ni petas ĉiujn: bonvolu sendi al ni korektojn ĉu pri la nomoj, ĉu pri la adreso.

Kelke da legantoj, eble ricevus duoblan kajeron. Bonvolu atentigi nin!

# JARRAPORTO DE LA VICSEKRETARIINO DE IKUE pri la jaro 1970

La jaro 1970 ne estis bonŝanca por IKUE sur diversaj terenoj. Pri la unua duono de la jaro vi povas legi en la sekretaria raporto dum la kongreso Brno/Klagenfurt. Dum la dua duono de 1970 la malbonŝanco daŭris.

Unue la *membronombro* malkreskis de 1114 el 49 landoj al 1089 el 48 landoj laŭ ciferoj de 31-12-1970. Plimultiĝis iom la membroj en Ĉeĥoslovakio, grave malplimultiĝis la membronombro en Okc. Germanujo kaj Usono. Kaŭzoj estis: nepago de kotizo pro neintereso en nia unuiĝo, kaj nekonsento pri la enhavo de ESPERO KATOLIKA.

Dua malfacilaĵo estis, ke *la ekspedo de E. K. al Ĉeĥoslovakio* ekde oktobro stagnas. La paketoj rekomendite senditaj dufoje revenis. Estas rekomendinde, ke en la nova estraro estos estrarano, kiu nur okupos sin pri tiu problemo, ĉar ŝajnas, ke apartaj *manskribite senditaj* ekzempleroj alvenas.

Plue *la jarlibro de IKUE* ne povis aperi en 1970, ĉar s-ro Berka ne ricevis la permeson presigi ĝin en Ĉeĥoslovakio. La financa stato de IKUE estis tiel malbona, ke eldono de jarlibro en okcidento neeblis.

Pri *la IKUE/KELI - kongreso en Klagenfurt* vi legis raportojn en EK. Pri la *skriba voĉdono* de la estraro vi poste trovos raporton de la balota komisiono.

*ESPERO KATOLIKA* aperis en nova preso kaj formato 10-foje (inkluzive duoblan numeron) kaj kune kun DIA REGNO en ampleksa « Kristana Esperanto-Revuo » unufoje. La lasta enhavis la raportojn kai dokumentojn pri la kongreso.

*Fonduso Nepagi Personoj.* Envenis en 1970 gld. 716,16, el kiuj gld. 396.74 por diskoj, pupoj kaj libroj el Ĉeĥoslovakio kaj gld. 230 estis destinitaj por Pollando. Komence de decembro mi ricevis por polaj abonoj ĉekon de 4000 germ. markoj. Mi transsendos la monon al la centra kaso en Svislando. Al s-ino Tuinder mi pagis gld. 800 por la ekspedkostoj ĝis julio 1970.

*Reprezentantoj.* La Landaj Reprezentantoj el Portugalujo, Koreujo kaj Madagaskaro ne reagis je mia cirkulero en la printempo 1970, dum ankaŭ ne en 1969 estis kontakto kun ili. Mankas Landa reprezentanto en Nova Zelando. La ceteraj sendis pli ol malpli regule sciigojn pri la membrostatistiko kaj adresaro.

*Propaganda Fako.* S-ro Simon Smits promesis dum la kongreso en Klagenfurt prizorgi ĝin, sed poste li redonis la taskon pro tro multaj aliaj okupoj.

Fine mi volas atentigi vin je kelkaj pozitivaj aferoj. Tio estis unue *la tendaro en Herbotice* (Ĉeĥoslovakio), kiu malgraŭ multaj malfacilaĵoj povis okazi kaj due la starto de la *junulara rubriko* en ESPERO KATOLIKA ekde novembro 1970 kun fotoj kaj raportoj pri la tendaro. La situacio de IKUE restos zorgoplena, sed mi esperas, ke la nova estraro havos la forton energie daŭrigi la laboron por nia unuiĝo.

*Blokker, la 27-an de januaro* 1971.

CORRY van KLEEF
vicsekretariino de IKUE

## FINANCA RAPORTO PRI LA IKUE-KASO
## por la jaro 1970

SVISAJ FRANKOJ

| | *Enspezoj* | *Elspezoj* |
|---|---|---|
| Saldo 1-1-70 | 2 186.— | |
| Kotizoj | 6 907.24 | |
| EK presado | | 9 563.05 |
| EK afrankoj | | 719.70 |
| Administrado | 48.20 | 457.18 |
| Fonduso « Nepagipovaj m. » | 37.50 | |
| Fonduso EK | 61.33 | |
| Kongreso | 46.60 | 15.60 |
| Donacoj | 1 004.88 | |
| Biloj - interezoj | 220.15 | |
| Diversaĵoĵ | 129.12 | 52.49 |
| | 10 641.02 | 10 808.02 |
| | | 10 641.02 |
| Saldo 31-12-10 favore al la banko | | 167.— |

| | |
|---|---|
| POSEDAĴO 31-12-70 | |
| Banka konto kuranta (saldo) | 167.— |
| Sparlibro no. 36 493 (St. Gallen) | 95.20 |
| Belgaj obligacioj | 5 750.— |
| | 5 678.20 |
| MALPLIIĜO DE LA POSEDAĴO | |
| Posedaĵo 31-12-69 | 8 027.60 |
| Posedaĵo 31-12-70 | 5 578.20 |
| *Malpliiĝo* | 2 449.40 |

RIMARKOJ

Ni do ŝuldas al la banko Fr. 167. Tio estas la plej malbona kasa stato de la lastaj jaroj. Kaj nun tuj venas la pago de administraj spezoj por la prezidanto kaj la redaktoro plus la preskostoj de la oktobra EK minus ricevo de kotizpago. Tio kune sumas je ĉ. sv. fr. 866. Do mankas al ni entute pli ol 1 000 frankoj.

Emmenbrücke, la 23-a de jan. 1971, la kasisto de IKUE, P. Scherer.

RAPORTO DE LA KASKONTROLANTOJ

Ni kontrolis plurajn erojn de la librotenado, komparante la pruvilojn kun la kontolibro kaj la brankaj eltiroj. Ĉio troviĝas en bona ordo Same la sumoj de la biloj estas ĝuste transskribitaj en la bilancon. Emmenbrücke, 23-1-71.

*Alois Stadelmann, Marlise Wandeler, Hansruedi Bucheli*

## FAKA IKUE.A ARANĜO DUM LA UK EN LONDONO

En la kadro de la Universala Kongreso,okazonta en Londono, (31.7 - 7.8 1971) IKUE starigos apartajn kunvenojn.

Provizore, la programeroj estas jenaj:

Dimanĉon (la 1.an Aŭgusto) solena inaŭgura Meso en la Universitata Preĝejo « Kristo Reĝo » en Gordon Square (en apudeco de Kongresejo) je la 16.a ptm.

Merkredon, en aparta salono de Kongresejo, je la 16.a, fak-kunveno de IKUE.

Vendredon, je la 14.a, ekumena kunveno IKUE-KELI.

Kompreneble, tiuj aranĝoj ne estos oficialaj, ĉar ne temas pri nia oficiala kongreso, tamen la ĉeesto de plimulte da IKUE-anoj permesos al ni interkunveni, interkonatiĝi, kaj starigi inter ni la necesan dialogon por la plibonigo de nia kara IKUE.

Aliĝu al la UK en Londono.

Ĝis revido en Londono

**LA PREZIDANTO**

## LA LEGANTOJ SKRIBAS...

Inter la precipaj rubrikoj de nia organo, taŭgan rolon plenumos la rubriko « La legantoj skribas », ĉar per tiu rubriko oni povas starigi veran plibonigon de nia movado, kaj de nia revuo.
Libera diskutato estas por ĉiuj, tamen la temoj devas koncerni nian vivon.
Espero Katolika estas precipe organo de nia Unuiĝo; ĝi devas pritrakti temojn laŭ niaj celoj: t. e. disvastigi katolikajn ideojn pere de esperanto, ĉeesti en la esperanta movado kaj ĉiam agi laŭ la katolika kredo. Ni ne akceptos disputojn, kritikojn, k. t. p. pri apartaj ekleziaj aŭ religiaj problemoj, pri kiuj ni ne estas spertuloj.
Legantoj povas senlime skribi, sed ne anonime.

**La legantoj skribas**

Kompreneble, la plimulto de skribintoj donis sugestojn, bondezirojn, opiniojn pri la « nova vojo » de IKUE kaj de nia revuo, EK.

**« Katolika Esperantisto »** (organo de katol. esper. hispanaj) en sia numero 52.a aperigas hispanlingve jenajn vortojn:
Kun granda ĝoio ni aperigas tiun anoncon (pri la nova Prezidanto), kiu finos la ĝermon de skismo evoluanta en la IKUE, kaj kialo de nia foriro el la Unuiĝo. Ni dankas Dion ĉar Li lumigis membrojn de IKUE, kiuj sukcesis iniciati la vojon de la paco, kaj de la vera unuiĝo. Ni gratulas al nova Prezidanto, kaj ni preĝas Dion por, ke protektu lin en tiu malfacila tasko, kaj por, ke li povu trovi taŭgajn kunlaborantojn.

**COLAS, en la nomo de Francaj katol. esper.aj:**

« Kredu, ke nia deziro estas, ke EK kaj IKUE, kiel nia Pariza ŝipo, se ili kelkafoje vagas kaj flirtas je la ventoj, ne droniĝu, kaj ne ekzistu inter tendancoj disputoj kaj rompiĝoj. Dio donu al ni la Saĝecon, kai helpu nin... ».

**Fr. WALTER LUDIN ofm**
Vi ricevis malfacilan taskon. Mi esperas, ke vi estos la prezidanto de ni ĉiuj por ke IKUE ne skismiĝos!

**IVO LAPENNA, prezidanto de UEA:**
Mi estas certa, ke, same kiel en la pasinteco, la kunlaborado inter la du organizaĵoj estos harmonia kaj utila.

**WALTER MUDRAK**
siatempe oni proklamis sanktan Franciskon de Assisi Patrono de la katolikaj esperantistoj. Estas do mia modesta esperesprimo, ke regu en nia anaro, ĉu landa ĉu internacia, do en IKUE, spirito laŭ sankta Francisko: do spirito kie superas la amo.

**A. B.**
...tamen ni devas, kaj mi esperas, ke kun helpo de Dio, ni trovos la ĝustan vojon al restarigo de nia katol. esper. movado, kiun reprezentas IKUE antaŭ la mondo. Espero Katolika fariĝu denove heroldo de niaj penadoj, kaj servanto de Papaj ideoj en la mondo. Estos necese ke EK, en komenca nova periodo pli multe sin dediĉu al la organizaj aferoj de la movado ĉar, laŭ mia opinio, plifirmigo de nia organizaĵo, IKUE, estas nepre necesa. Ni revoku ĉiujn niain anojn, kiuj, pro malkonsento, eksiĝis de IKUE.

**Pastoro ADOLF BURKHARDT, prezidanto de KELI**
...mi arde esperas, ke venos en IKUE plena repaciĝo, tiel, ke foririntoj revenu kaj la « venkitoj » ne foriru, kaj ke la komencitaj bonaj rilatoj inter IKUE kaj KELI ne forvelku.
La kapablo pardoni estas esenca parto en la amo, kiun Dio montras al ni per Jesuo Kristo, kaj mi fidas, ke ĝi montros sian forton ankaŭ por tio, ke la akrajn, vortojn, kiujn oni eldiris kaj skribis dum la pasintaj jaroj, oni reciproke povus pardone forgesi.
Skismo en la katolika Esper. movado certe ne skuus la mondon, kiu apenaŭ atentas pri ni, sed ĝi estus serioza bato por la tuta kristana esper. laboro; kaj denove mi ripetas mian esperon, ke vi kaj la tuta membraro sukcesu eviti ĝin.
...la espero, ke ankaŭ sub via prezidanteco daŭros kaj plifirmiĝos la kontakto inter niaj du organizaĵoj, kiu preskaŭ ne ekzistis dum la unuaj 50 jaroj, spite de la origina intenco de pastro Peltier, kaj kiun fine iniciatis via antaŭulo, s.ro Tujnder.

**N. W. VIGAR**
Mi certe bone scias, ke via posteno prezidanta estas iom pli ol ordinare malfacila, kaj miaj sinceraj preĝoj estas por Vi, ke nia kara IKUE, por kiu niaj pioniroj tiel arde laboradis, eniros kun la beno de Dio tute novan kaj sukcesan estonton.

**DE LA PUENTE**
Mi opinias, ke oni devas fari IKUE-n por ĉiuj katolikaj esperantistoj, kaj, konsekvence, la enhavon de EK, kaj restarigi la konfidon perditan. Tamen oni ne devas fermi la revuon al al legitimaj seriozaj, progresemaj tendencoj. En ĉiuj aferoj estas grava danĝero: kiam oni devas restarigi malbonan devion en unu direkto, fari ankaŭ malbonan devion en kontraŭa direkto. Estas la tielnomita leĝo pendolo... Oni devas agnoski la diversajn tendencojn, kondice, ke ĉiuj estu en katolika tereno. Amo al ĉiuj (finfine amo estas la devizo de la katolikoj) devas esti la celo de niaj agoj, pro tio niaj kritikoj devas esti respektplenaj, sen iaspeca ĝeno por kritikatoj, kai faritaj kun karito kaj amo al ili... Ni devas nur korekti la erarojn...

**Pastro A. BECKERS**
...tiu elekto estas eble mejlstono en la historio de IKUE. Mi estas kontenta, ke denove estas pastro prezidanto de IKUE. Tio estas garantio por la movado.

**Truus DURENKAMP**
mi tre esperas, ke nia afero denove prosperos

**N. G. HOEN**
... ŝajnas al mi, ke Vi, kiel fervora batalanto por forigi la krizon en IKUE, estas la ideala nova Prezidanto, kiu povos gvidi nian karan movadon al nova kaj multe pli feliĉa — ĉar al Romo pli fidinda — situacio

**S. MAUL**
... tamen mi esperas, ke vi, en via nova funkcio ne forgesos kaj malatentos la grandan minoritaton... Vi devas zorgi pri la diverĝaj interesoj de ĉiuj kaj atenti la dezirojn de ĉiuj flankoj.

**V. JAKOV**
Mi ĝoias ke nova Prezidanto de IKUE estas pastro; tiel devas esti. Mi esperas, ke komunaj kongresoj daŭros en ekumena bazo, kaj daŭros presi la komuna gazeto-Kristana esperanto. La ekumena ideo devas kreski, nun, kiam gvidantoj de IKUE kaj KELI estas pastroj, la komunaj kunvenoj estos unu. Tiel devas esti!

**F. CASAR**
Nun la katolika esper. movado havos ege malfacilajn taskojn por solvi; eble neniam en la historio de IKUE la situacio estis tiel grava pro ĝi kiel nun...

**EL TRE AMIKA NACIO (malfermita letero al la tutmondaj katol. esper.oj, okaze de la 2.a landa kunveno)**
... multaj EK legantoj, vivantaj en premaj vivkondicoj, rigardantaj kun espero al Sankta Patro, simbolo de la unueco en la kredo, ege deziras, ke EK denove fariĝu universala ligilo de ĉiuj katolikaj esperantistoj en la mondo...
EK estas revuo destinita por tuta mondo, pro tio ĝia redaktoro penu studi la problemojn de pli larĝa vidpunkto. Ne doni lokan aŭ landan opinion por mondan. La estraro de IKUE kaj la redaktoro de EK penu kompreni mentalecon de ĉiuj katolikaj esperantistoj, servi ilin ja estas ĉefa tasko. Ili atendas de EK spiritan subtenon, verajn informojn de tuta Eklezio — batalanta por vera, kristana, paca surtera vivo. La pacon de Kristo penu — precipe niaj gazetoj — semi kaj enkonduki unue en ĉiutagan vivon de nia movado.
Pro tio ni petas: ni trovu, en nomo de Kristo, denove forton kaj volon al repaciĝo!

**HISPANA BULTENO (organo de KEHA) n.ro 51**
Ni deziras, ke IKUE trovu denove la vojon de la harmonio, de la repacigo kaj de la amo.

**M. S.**
Fakte estas necese, ke ambaŭ partioj (de la nova kaj de la malnova estraro) ne rigidiĝu sed, ke ili lasu vivospacon unu por la alia. Por tion efektivigi estas necese havi varman koron. Kaj ni kredas, ke vi fakte havas la varman koron, kiel tion atestas jam la unuaj viaj faroj, kiel de nova IKUE Prezidanto. Pere de reciproka respektado, kaj la amo, certe malaperos nuboj en la hodiaŭa katolika E. - movado...
La ŝanĝoj en IKUE certe fariĝos la refreŝiĝa banejo sed nur sub la kondicoj, ke restos ne tuŝitaj la demokratio, kaj libera esprimado en EK.

**Nia simpla komentario estas jene:**
Ĉiuj pravas. Mi deziras antaŭenmarŝi sur tiuj vojoj, kiujn ili sugestis, kaj arde deziris.

De iuj skribintoj mi ne konatigis la tutan nomon, ĉar apartaj situacioj ne permesas al mi aperigi tiujn. Sed la redakcio tre bone konas ilin.

---

**NI GRATULAS**

Nia estrarano, Patro Lovro Kiŝ ofm. celebras 50.an datrevenon de sia sacerdotiĝo. Al nia fidela, kaj nelacigebla kunlaboranto la bondezirojn de la tuta IKUE, kiu preĝas por li por, ke li havu grandan premion pro sia laboro.

# EKUMENAJ INFORMOJ

NYBORG (Danlando) Pli ol cent eklezioj (protestantaj, anglikanaj, ortodoksaj) partoprenis, per 250 reprezentantoj, la sesan eŭropan kunvenon de la Eklezioj. Katolikaj delegitoj ankaŭ ĉeestis kies ĉefaj estis Mons.ro Etchegaray, episkopo de Marseille, kaj patro Duprey (sekretariano por la unuiĝo de kristanoj).
Prelegis luterana episkopo de Magdeburgo pri la du momentoj de nia kristana vivo: la liturgio kaj la karitagado. Pastoro G. Crespy (prof.ro en la teologa Universitato de Montpellier) refuzis la ideon de la morto de Dio.
Prof.ro G. Nagy (de Budapesto) komentariis la eklezian servon per la teologa historio de la homaro.

Kard. KOENIG, trapaŝinte Ĉeĥoslovakujon, kie interparolis kun Mons.ro Tomasek, alvenis al Pollando. La revuo Zycie Warsawy aperigas artikolon de katolika deputito Zablocki (el la katolika grupo Znak) en kiu oni parolas pri la ebleco de kunlaborado inter la Eklezio kaj la Ŝtato.

---

# AL ĈIUJ REPREZENTANTOJ, KAJ PERANTOJ DE IKUE BONVOLU ATENTI JENAJN RIMARKOJN

## A = Adresaro.

Ni devas renovigi nian adresaron. Mi petas ai ĉiuj landaj reprezentantoj sendi al mi liston

1) de la nunaj membroj de IKUE, ĉar ni intencas kontroli la nuntempajn abonantojn
2) de la foririntaj membroj, ĉar ni deziras regajni al IKUE la estintajn membrojn, sendante al ili kopion de nova EK.

Bonvolu ankaù dissendi ekzemplerojn (por propagandi nian asocion) al la simpatiantoj kiuj, eventuale, povos, sekve, membriĝi.
Ekzemplerojn mendu rekte al mi.

## B = Redakcio.

La redaktado de nia revuo ne estas aparta afero de redaktoro (kiun ankoraŭ ni ne konas) sed estas komuna interesiĝo de ĉiuj IKUE-anoj, precipe de estraranoj en ĉiu lando.
Viajn kunvenojn, viajn oficialajn protokolojn, raportojn pri via vigla vivo, iniciatojn, sugestojn, proponojn, dezirojn, artikolojn, por la pliriĉigo kaj la plibeligo de nia revuo, vi povas, eĉ vi devas skribi ĉe vi, kiel redaktora agado de ĉiu nacia asocio.
Sekve, la redaktoro de EK fariĝas la fin-redaktoro, ĉar li estas tiu, kiu kombinos la tutan materialon por aperigi la kajeron de la revuo.
Tiamaniere naskiĝas la revuo, kies vi ĉiuj povas fariĝi gepatroj.

**LA PREZIDANTO**

# LANDAJ REPREZENTANTOJ

| | |
|---|---|
| Anglujo | - S.ro N. W. Vigar, 28 Franklands Drive, Addlestone - Surrey |
| Aŭstralio | - S.ro V. J. Timmins, 73 Alexandria Parade, Hornaby N. S. W. |
| Aŭstrujo | - S.ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, A-1030 WIEN III, p. k. 105.713 |
| Belgujo | - S.ro E. Paesmans, L. Koeportstraat 64, Antwerpen, telef. 321751 |
| Brazilo | - B. E. L. Placa da Republica 54, 1 e, Rio de Janeiro |
| Ĉeĥoslovakio | - S.ro Aleŝ Berka, Na haràzi 1423, Vsetìn |
| Francujo | - S.ro Gaston Véron, Place de la petite Bruyère, Donfront (Orne) poŝtkonto: G. Véron, CCP Rouen 1188-63 Z |
| Germanujo | - S.ro Gerhard Vogel, Tondernstrasse 36, D-5 Köln 30 poŝtk. Köln 166355 |
| Hispanujo | - S.ro Miguel Martinez, Av.da San José 105, pral. Zaragoza |
| Irlando | - S.ro P. J. O' Reilly, « Woodbine », Bluebell, Dublin 12 |
| Italujo | - S.ro C. C. Ferrari, viale dei Mille 37, I-20129 Milano - telef. 267.895; poŝtkonto 3-7791 |
| Japanujo | - S.ro prof. Eiiti Minami, Nakano-5-chome, 26-36 Nakano-ku, TOKIO |
| Jugoslavio | - P. Felix Stricki, Hadzi Melentija 75, Beograd |
| Kanado | - S.ino Pauline Proulx, 790-80 e rue Est, Charlesbourg, Québec |
| Kolombio | - P. Luis E. Palacios Toral, Apartado Aéreo 12-03, Cartagena |
| Koreo | - Paul Kiseng Kim, I. P. O. Box 2752, Seoul |
| Madagaskaro | - A. K. E. M., B. P. 1399, Tananarive, pk. 258.83 |
| Nederlando | - S.ro S. P. Smits; Kloosstraat 55, Zoetermeer, pk. 685124 |
| Polujo | - Pola Katolika Unuiĝo Esperantista, Zabrze, skr. pt. 68 |
| Portugalujo | - S.ro M. M. Lourenĉo Gouveio, Caixa Postal 456, Funchal-Madeira |
| Svislando | - p. W. Flammer, CH 9106 Zürchermühle, Urnäsch AR |
| Urugvajo | - D.ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Flor) |
| Usono | - S.ro H. S. Corlett, 7605 Winona Lane, Sebastopol, California 95472 |

---

**Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)**

---

**Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando**
**Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)**

---

**Presejo: Soc. Tipo-litografica G. e M. Bigliardi - Via Tana 18 - I - 10023 Chieri (TO)**

---

**Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70 - Supplemento al n. 6 de « Lungo la via »**